



N-ro 5 - 2006.08.04

# Florenca Lilio

KURIERO DE LA 91A UNIVERSALA KONGRESO DE

*Tuta tago sidante ĉe komputilo por tajpi la alvenantajn informojn por la Florenca Lilio pruvis, ke UK kuntrenas lavangon da eventoj por raportoj; sed ankaŭ ke la esperantistoj malavare helpas por la realigo de la kongresa kuriero. Ĉi tiu numero plenplenas je raportoj, ĉiuj aŭtentikaj, fidindaj, veraj.... krom unu. Kiu, la unua, divenas kiun, tiu ricevos kafon de la redaktoro.*

## KALEJDOSKOPA SERIO DA EVENTOJ

Okazis...

**Ĵaŭde la estraro respondis.** Dudek bone pripensitaj demandoj estis la rikolto de la ĵaŭda programero "Estraro respondas". Estis tri specoj da demandoj: pri la agado, pri la financoj, pri la nuna kongreso. En la lasta minuto venis grava kaj ampleksa demando, kion UEA konkrete faras por disvastigi esperanton ekster la kongresoj. Aliaj demandoj pri agado temis pri Eŭropa Unio, pri Afriko, pri komputiloj kaj pri UEA kiel lerno-pova organizaĵo. Ekonomiaj demandoj temis pri ebleco de subvencioj kaj pri rentumoj. Konkretaj kongresaj demandoj temis pri manĝejoj, ekskursoj, ebleco mendi la kongresan numeron de Revuo Esperanto, kaj pri salutoj al la kongreso. Ĉiuj demandoj ricevis mallongajn respondojn, kaj pluraj el ili estos plie pripensitaj en la estrara laboro. *Raportis Ulla Luin, KN 81*

**Ĝemelurbaj agadoj.** La kunsido pri ĝemelaj urboj okazis ĵaŭde en Florenco laŭ la programo en Salono Grazzini kun partopreno de pli ol 40 esperantistoj, kiuj multe interesiĝas pri la nuna stato de tiu agado kadre de UEA kaj raportis mem pri diversaj iniciatoj. La kunsidon gvidis la estrarano pri landa agado kiu koncize raportis pri la agado de la UEA-komisiito s-ro Wu Guojing el Ĉinio. Oni aŭdis informon pri la agado de la E-centro de Herzberg kaj la ĝemeliga rilato kun la pola urbo Gora el Pollando. Aliaj partoprenintoj prezentis agadojn faritajn en Eŭropo por projekto "fariĝu lingva ambasadoro", ankaŭ pri spertoj entreprenitaj en Kioto, Kievo, Parizo, en Bulgario, Belgio, Hungario, Kroatio kaj aliaj. Oni povis konfirmi la gravecon de tiu agado kiel konkreta maniero utiligi esperanton kiel ilon por amikeco, interfratiĝo interpopola. *Raportis: M. Gutierrez, KN 76*

**Interesa vizito al komerca ĉambro de Florenco** - matene 25 personoj ĉeestis prezentadon en la kongresurba komerca ĉambro. D-ro Martinuzzi, estro de ĝia disvolviga sekcio, skizis la strukturon kaj funkciadon de la ĉambro kaj donis ĝeneralajn informojn pri la ekonomia vivo en la provinco Florenco. Finiĝis la kunveno per interesaj diskutoj dum agrabla bufedo. *Raportis: Roland Rotsaert, KN 209*

Ĵaŭde je la 15h30 **Giuliano Tulone**, juĝisto, el rimarkindaj teatraj kapabloj, prezentis 2 diversajn pecojn. En la unua, post esti priskribinta "gramelot" (onomatopea recitado, per "vortoj kiuj signifas nenion sed elvokas la sonojn de lingvo) imitis per ĝi la italan lingvon kaj esperanton, por legi pecon el la freŝa traduko de la "Gefianĉoj". Poste li legis la unuajn 7 tercinojn de la Dia Komedio en deko da lingvoj, inkl. de E-o, laŭ la plej bonaj ekzistantaj tradukoj kaj imitante tipan deklamanton de ĉiu lando, karakterizita laŭ lando kaj profesio. En la dua parto de la spektaklo li prezentis unu el la plej famaj monologoj: "Pri la malutilo de la tabako" de Ĉeĥov - tragik-komedio ĵusdate retradukita en E-on de Korĵekov - en kiu, iom humure kaj dramece, aperas oratoro devigita paroli fare de sia tiraneca edzino: la prelego pri tabako transformiĝas en patosan korelverŝon pri lia malfeliĉa vivo. Inter la du partoj de la spektaklo, ludis muzikan interludon flutistino Lidija Gomilickaite-Grudzinskaite el Litovio. **Dua surscenigo: vendredon la 4an de aŭgusto, je 11h15, Salono Canuto.** *Raportis Ermigi Rodari, KN 314*

**Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL)** organizis du kunsidojn. La unua, lunde, kunvenigis ĉirkaŭ 40 personojn por aŭskulti la prezentojn de Daniele Vitali, Alain Favre kaj Anita Perriĉ-Altherr pri la lingva situacio de Italio kun, krom la itala, 12 agnoskitaj lingvoj kaj pluraj aliaj... Tiujn prezentojn sekvis vigla diskuto. Ĵaŭde matene membroj de IKEL kunvenis por diskuti kaj voĉdoni pri la vivo de la asocio. *Raportis Nicole Margot, vicprezidantino, KN 1046*

**Vingustumado** (organizita kadre de la Junulara Programo) okazis en la kongresejo, ĵaŭde posttagmeze, kun la ĉeesto de pli ol 70 "volontuloj" kiuj malaperigis ĉirkaŭ 40 litrojn da itala vino (el 8 diversaj specoj). Dum la "gustumado" ĉiu ĉeestanto proponis el la nacia repertuaro tiujn kantojn, kiujn oni kutimas kanti dum vintrinkado. *Raportis Daniela Tagliafico, KN 2186*

**ELF-AREK RENKONTIĜO.** Filatelistoj, esperantaĵ-ŝatantoj, scivolemuloj, interesitoj BONVENAS je la renkontiĝo de E-ligo Filatelista. Rendevu-loko: **vendredon la 4an de aŭgusto** je la 17h00 ĉe enirejo de Palaco de Kongresoj. *Invitas: Elda Doerfler, KN 1014*

**Fervojistaj kunvenoj** - Dum la 91-a UK la fervojistaj esperantistoj havas sian programon. Jam dimanĉe post la inaŭguro la kongresa programo certigis preskaŭ unuoran eblecon kunsidi, kie partoprenis 30 kongresanoj. La kunsidon gvidis s-ro István Gulyás (kn 226), vicprezidanto de Internacia Fervojista Esperanto Federacio, komitatano "A" de IFEF de UEA. Li klarigas la opinion de la CO: ne eblas ĝustatempe informi la fakajn asociojn pri la datoj de la dumkongresaj kunsidoj. S-ro Romano Bolognesi prezidanto de IFEF invitis la fervojistajn gekolegojn por la lunde okazontaj tuttagaj aranĝoj, kiujn organizas la italaj fervojistaj esperantistoj helpe de la "dopolavoro ferroviario". Lunde la 31-an de julio je la 10-a horo kolektiĝis kvindek kongresanoj el 14 landoj. Unue S-ro Gulyás malfermis la kunsidon, konigis la tuttagan programon. Poste s-ro Bolognesi prezidanto parolis pri la detaloj de la programo. Poste sekvis la raporto de la vicprezidanto pri la 58-a IFEF-kongreso okazinta en majo en la ĉina metropolo Ŝanhajo. Tiu ĉiu kongreso estis la unua, kiu okazis ekster Eŭropo. Tie ĉeestis 226 personoj el 18 landoj, inter ili 115 el Eŭropo. En Ŝanhajo okazis pluraj fakaj prelegoj, vizitoj al fervojaj instalaĵoj, ekzemple la funkcia magnetŝveba fervojo. Post la raporto sekvis alparoloj de la landaj reprezentantoj kaj aliaj ĉeestantoj. Estis mencio pri la manko de la Esperanto-klarigoj de fervojaj horarlibroj. Fine de la kontaktkunveno la partoprenantoj komune vizitis fervojhistorian muzeon. Posttagmeze sekvis ekskurso per trajno al pitoreska montara regiono de Florenco al la urbeto Marradi. Marde la 1-an de aŭgusto denove kolektiĝis la fervojistaj esperantistoj en la salono Migliorini. István Gulyás gvidis la kunvenon, kiu denove parolis pri la ŝanhaja IFEF-kongreso, kaj anoncis, ke la venonta kongreso de IFEF okazos en Francio, en Parizo inter la 12-a kaj 19-a de majo 2007. Poste s-ino Sylviane Lafargue (KN 1000) detale informis la ĉeestantojn pri la venontjara IFEF-kongreso. Romano Bolognesi parolis pri la celo de la IFEF-organizo, kaj akcentis la gravecon de la kontakto kun Monda Unio de Fervojoj (UIC), kaj kun la Internacia Kultura organizo de la fervojistoj (FISAIC). La partoprenantoj faris demandojn pri la prezoj kaj loĝeblecoj kaj aliaj organizaj temoj rilate al la pariza kongreso, kaj aliaj fakaj eĉ movadaj temoj. *Raportis István Gulyás (kn 226)*

**TADEN (nefumantoj)** kunvenis mardmatene, samtempe kun publika kunsido de la Akademio, tamen 21-ope (9 landoj). La prezidanto Jan Bemelmans menciis la deklaran agadon kiel Asocio de post la Praga UK. Por la bulteno "Puraj Pulmoj" (liverebla malpli koste interrete) bonvenas ĉe li eĉ nacilingvaj artikoloj. Li esprimis bedaŭron pro malsukcesaj procesoj en Usono de tabak-viktimoj kontraŭ fabrikantoj kaj ne akceptita popoliniciato de la nederlanda GAN al la parlamento. TADEN mem estas maltro konata inter esperantistoj, do necesas varbado. Relative granda deficiito ne igas altiĝi la kotizon, pluraj ja pagas pli ol necese al la kaso. La eldono de "La Fume" de la aŭtoro prof. R. Molimard mem esperantigita, ne eblas al Kava Pech (Petro Chrdle) sen garantia kapitalo, kiun la kasisto kun ĉies helpo – kaj mecenato – esperas kolekti: 2000 EUR por 400 ekzempleroj. La usona situacio laŭ Arnold Victor estas kontentiga en pluraj ŝtatoj, kies registaro apogas nefumismon (Novjorkio). Ankaŭ trinkajestroj mem konstatas, ke la klientoj plejparte ne fumas. Italo Giovanni Conti disponigas grandan amason da poŝtkartformataj petiloj tri lingvaj, eldonitaj 100.000-kvante kun morala apogo de IEF: "Si prega di non fumare / bonvolu ne fumi". Henri

trafiko. Pro la publika indiferenco li pledos severe kontroli la fummalpermeson en sportejoj kafeterioj (1-an de januaro 2007). Kuracistoj avertu malsaniĝintojn fumĉesi: se ili ne sekvas la konsilon, ili mem pagu la kurackoston. Momĉilo Krstić surpriziĝis ke serba cigaredo produktisto ĉesis disdoni cigaredojn. La italojn laŭdas la kasisto, ke li – post konsekvenca purado al malobservantoj – nun ĝenerale rezignas pri fumado en publikaj lokoj. *Raportis R. Moerbeek, KN 85.*

**Lastaj subkomitataj kunsidoj** - Per du subkomitataj kunsidoj en la mardo finiĝis la vico de UK kunsidoj. Unu el ili temis pri landa kaj regiona agado, en kiu oni diskutis pri kunlaboro kaj informado en multaj formoj: kunlaboro inter junuloj kaj pliaĝuloj, kunlaboro inter landaj asocioj aŭ inter regionoj de lando, kunlaboro per projektoj. Estis diskuto pri projekto Indiĝenaj Popolaj, pri lingvo de Paco kaj pri semajno de Internacia Amikeco. La eblecoj de UEA pri parlamentaj kontaktoj kompare kun landaj asocioj estis menciitaj. La lasta subkomitata kunsido temis pri edukado kaj pri tiu temo UEA kunlaboras kun ILEI, la instruista organizaĵo. Oni diskutis pri trejnado por instrui esperanton kaj pri projektoj kaj seminarioj kiuj instruas instruadon. Aliaj diskutataj temoj estis ekzamenoj kaj edukado por interpretistoj el aŭ al esperanto. laste estis diskuto pri ideoj de universitat-nivelaj retaj projektoj. Raportoj el tiuj ĉi subkomitataj kunsidoj estos transdonataj al la Komitato vendrede. *Raportis Ulla Luin, kn 81*

**Kvindeko da kat-ŝatantoj kunsidis.** Pli ol kvindek interesiĝantoj atente sekvis en mardo la parolojn de Ingrid Nasholm, unue pri la malsano komuna al homoj kaj katoj manifestiĝanta per pligrandigo de la miokardia muskolo, kaj poste pri interrilatoj kato-homo. Francisco L. Veuthey, kiu ankaŭ gvidis la kunsidon, prezentis la gazeton "Folioj de Kat-amikaro", kiun li redaktas, kaj fine legis kortuŝan rakonton pri perdita katino, kiu, pere de sonĝo, jarojn poste, savis la vivon de sia antaŭa posedantino de perejo en hitlera mortkoncentrejo. Marjorie Boulton, la prezidantino de Rondo "Kato" / Esperantista Kat-amikaro, sendis salutojn. *Raportis F. L. Veuthey (KN 165)*

**LSG** - London, post kvaronhora prokrasto, 36 kongresanoj sukcesis viziti la jarkunvenon de la Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj (LSG) en la salono Marignoni. Oni aŭdis raportojn pri agado en la franca gazetaro kaj televidservo kaj pri prelego dum la usona jarkunveno. Oni reelektis la malnovan estraron por dujara servodaŭro ĝis okazos jarkunveno dum la postsekva UK. Oni decidis aliĝi al internacia organizo LIGA post esploro per la estraro. Anonciĝis ekskurso al Lucca, Pisa kaj Torre del Lago. *Raportis: Toĉjo, KN 1402 - Arnoldo, KN 774*

**Koncerto de Andrej Korobejnikov** - Juna pianisto kiu pianludas de sia 5a jaraĝo ankaŭ dum ĉi UK regala Esperanto-publikon per sia virtuoza prezento de la verkoj de famaj komponistoj: Beethoven, Schubert, Chopin, Musorgskij kaj Raĥmaninov. Kiuj pro la samtempa teatraĵo maltrafis lian koncerton jaŭdon vespere havos eblecon ankoraŭ aŭskulti lian koncerton **vendredon je la 11h15 en la salono Canuto** kaj dum la **Internacia Arta Vespere**. Ĉiukaze ni ankaŭ atentigas vin pri lia plurlingva TTT-ejo: <www.korobejnikov.com>

**GRAVA ANONCO POR ITALOJ KAJ NE NUR** - La venonta numero de la nacia itala revuo "L'esperanto" estos tute dediĉita al la Universala Kongreso de Florenco (UK en Italio post pli ol 50 jaroj meritas iom da atento, ĉu?). Italoj estas varme invititaj kontribui al la redakto sendante fotojn, raportetojn, impresojn aŭ kion ajn rilatan al UK. Kompreneble ankaŭ neitaloj rajtas kontribui per siaj impresoj, aŭ eĉ plendoj (espereble malmultaj), kiujn ni certe konsideros post 50 jaroj, kiam estos organizita la venonta UK en Italio... Klopodu sendi ĉiujn kontribuojn ene de aŭgusto, laŭeble, aŭ se vi ne povas, kontaktu la redaktoron mem, por interkonsenti. Sendu ĉion al: [revuo@esperanto.it](mailto:revuo@esperanto.it) (kaze de grandaj dosieroj, bv kontakti antaŭe la redaktoron por ke ili ne estu rifuzitaj de la adreso). **Pier Luigi Cinquantini**

**Helpu al EEU** – kiam Vi skribos al via(j) EU-parlamentano(j) informu pri tio al EEU kaj informu pri la rezulto, mi petas. *Heleno Fantom, reprezentanto al EEU de Britio, KN 2116*

**Filatelistoj (sed ne nur...)**. Kiu ankoraŭ deziras stampigi siajn bildkartojn per la oficiala kongresa poŝto-stampilo, povas ricevi tiun servon ĉe la filatela giĉeto de la florenca centra poŝtoŝtampilo ĝis 2006-09-07 (sepa de septembro 2006). Laborhorho de la giĉeto: ĝis sabato 2006-08-05: 8.15 – 19.30 / ĝis 2006-09-07: 8.15 – 13.30 / Adreso: via Pellicceria, 3 – sportello filatelico. Por atingi tiun giĉeton: - iru al "Piazza della Repubblica" (inter la katedralo kaj Ponte Vecchio); rigardante la grandan triumfarkon atingi la maldekstran arkadaron; eniru la grandan poŝtoŝtampilon kiu situas tie kaj petu pri la giĉeto *sportello filatelico*.

**Kolektantoj (sed ne nur...)**. Vi povas tre facile provizi al vi kaj al la Esperanto-movado valorajn. Kiel? - Iru al la giĉeto kie oni vendas la oficialajn artajn bildkartojn (kie vi ricevis la dokumentojn); - Tie vi povas stampigi la aĉetitajn bildkartojn (plus eventualajn kromajn paperaĵojn viajn) per: stampilo simila al la oficiala kongresa poŝto-stampilo, stampilo kun jenaj titoloj: prezidanto, vic-prezidanto, sekretario, trezoristo, taŭga por kolekti subskribojn de elstaruloj de ajna organizaĵo (UEA, Itala Esperanto Federacio, LKK, ajna landa sekcio, ktp). Liberigu vian fantazion, postĉasu gravulojn por subskribo kaj disponigu por venontaj aŭkcioj.

**La festa disdono de la atestiloj pri la internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA okazos vendrede je la 10h45 en la salono Migliorini. Sian diplomon transprenos 10 personoj (3 mezniveluloj kaj 7 elementniveluloj). Venu aplaŭdi ilin!**

**Kie mi estas? Kie vi estas?** Por respondi al ĉi tiu simpla demando Patrick Segur inventis la sistemon Geoloko en 2000. Ĝi dividas la mondon en 18 zonojn, atigante precizecon de 13-cifera kodo, kiu ebligas lokigi objekton aŭ personon en areo de apenaŭ 12 metroj oble 8 metrojn. Por scii pli: [www.geoloko.com](http://www.geoloko.com). Patrick Segur partoptenas en nia 91a U (kn 2193). Se Vi sendas al li vian GPS-adreson (latitudo kaj longitudo), li sendos al Vi perrete Vian Geokodon'n ene de 3 tagoj <[patrick.segur@geoloko.com](mailto:patrick.segur@geoloko.com)>. Numero Geoloko de s-ro Segur en Parizo: 1.7124.4492.6959. Adreso: 33, rue Galilée, F-75116 Paris, Francio.



**Rat-Man**, "la plej fama vivanta heroo de Marvel", bildstria ridiga (kaj ridega) karaktero inventita de la itala Leonardo Ortolani, povus baldaŭ paroli Esperante. Venu renkonti lin vendrede, de la 14h00 ĝis la 15h00, subteretaĝe antaŭ la enirejoj de salono Lapenna, por konatiĝi kun ĝi, kaj ĝui ĝiajn bildstriojn unuafoje tradukitaj en E-on! *Raportis: Daniele Binaghi, KN 1241*

**Gazetoteko Lanti** - Gazetoteko Lanti funkcias de 2003 kaj ĝi havas la celon havigi al ĉiu esperantisto ie ajn en la mondo, tute senpage virtualajn ekzemplerojn de malnovaj magazinoj. Estos domaĝo, ke post la malapero de esperantisto, familianoj forprenas aŭ malaperigas liajn aŭ ŝiajn librojn kaj magazinojn. Librojn oni reldonas, sed ne tiel okazas pri magazinoj, kaj tial multaj el niaj magazinoj esperantistaj, kiujn oni produktis per tiom multe da peno kaj malfacilo finfine malaperiskaj estas same kiel ili neniam ekzistis. Se oni vizitas la tt-ejon <http://www.gazetotekolanti.com>, oni povas denove legi kelkajn malaperintajn magazinojn, kiel "Popola Fronto", farita dum la hispana intercivitana milito, aŭ "Juna vivo" farita en Svislando je la 30-aj jaraj de la lasta jarcento, aŭ "Esperanto Katolika", aŭ "Juna Penso", aŭ "Nia voĉo"... kaj tiel plu ni pligrandiĝas la kolekton de magazinojkaj ties numeroj. Eblas printi ilin kaj tiel denove rehavi surmane, aŭ krei CD-romon kaj transdoni al geamikoj esperantistaj. Sed plej efike oni povas helpi al nia celo per sendado al zorganto de la Gazetoteko (J. de las Heras, ap. 4461, 30080 Murcia, Hispanio) ekzemplerojn aŭ ties fotokopiojn de tiuj malnovaj (eble unikaj) magazinoj, kiujn ni eble ne atentis. Tion farinte, vi estos protektanto de niakulturo esperanta kaj ankaŭ de nia trezoro. Afable invitas

**RADIOAŬSKULTANTOJ**. Iom malfrue sed ĉiam ĝisdate ni raportas pri la kunveno de AERA-radioaŭskultantoj, okazinta pasintdimanĉe. Gvidis la kunsidon Barbara Pietrzak de Pola Radio, kun la ĉeesto de redaktoroj de aliaj 3 radiostacioj: por Radio Kubo, Maritza Gutierrez; por la Itala Radio, Antonio De Salvo; por Radio Vatikana, Carlo Sarandrea. Dum la agrabla renkontiĝo ĉiu redaktoro prezentis la faritan kaj planatan agadon. Evidentiĝis la bezono, ke aŭskultantoj klopodu subteni pli kaj pli la internaciajn elsendojn en E-o, kiuj estas unu el la malmultaj rimedoj por tuja disvastigo de informoj kaj por kontaktiĝi senpere kun Esperanto. Kiel modelan ekzemplon de subtenato oni menciis la oftegajn raportadojn de prof-ro d-ro Rokuro Makabe kaj de aliaj konstantaj aŭskultantoj. Interesa estis la temoj levitaj ankaŭ de la demandoj de la aŭskultantoj, i.a. pri la "institutcia" rolo kaj jura etato de ĉiu redakcio. Oni anoncis vastan raportadon pri la 91a UK – samtempe dum la kongresa semajno kaj en la postaj monatoj. Por scii pli pri la elsendoj, viziti la TTT-ejojn de la koncernaj radiostacioj:

**Ĉina Radio Internacia:** <http://es.chinabroadcast.cn/>

**Itala Radio:** <http://www.international.rai.it/radio/multilingue/presentazioni/esperanto.shtml>

**Pola Radio:** <http://www.radio.com.pl/polonia/eo/>

**Radio Kubo:** <http://www.cubanoticos.ain.cu>

**Radio Vatikana:** <http://www.vaticanradio.org>

**Arkivo de elsendoj:** <http://www.radioarkivo.org>

## Lastegaj aliĝoj

- 2204 S-rino Olivier Dieumegard, Francio  
2205 S-ro Giordana Molle, Italio  
2206 S-rino Megan Dixon, Italio

**Krome, 55 individuoj aĉetis unutagajn kartojn.**

## Pri la kongreso en gazetaro

“**Toscana Oggi**”, regiona semajnaĵo por informado, 30an de julio 2006. Per la titolo “Esperanto, Toskanujo je la centro de la mondo” ĵurnalisto Damiano Fedeli raportas pri la Infana Kongreseto en Prato. La stilo estas sufiĉe pozitiva: la teksto preskaŭ tute estas intervjuo kun unu el la respondeculoj de la IK, Leonardo Pampaloni (kiu eĉ aperas en granda fotografio)

“**Leggo**” (senpaga ĵurnalo, kun paĝoj diversaj en ĉiu itala regiono), **QN La Nazione** kaj **La Repubblica**, publikigis la 31an de julio en la paĝoj pri florenca kroniko la bedaŭrindan sciigon pri kongresano kiu travivis malagrablan akcidenton. La artikoloj klare mencias ke li “estas en Florenco por partopreni en la UK”.

Dank’ al senlaca agado de esperantisto **Giorgio Bronzetti**, kiu restas en sia loĝurbo Chieti, aperis trideko da artikoloj en pluraj ĵurnaloj, ĉefe en regiono Abruco (centra Italio). La **infanoj de la Kongreseto** estis intervjuitaj de itala ĵurnalistino kiu publikigos artikolon en la itala semajnaĵo “**Oggi**” (legata de pli ol 3 milionoj da personoj ĉiusemajne). La artikolo aperos ĉirkaŭ la 15an de aŭgusto.

Plie, televido **La7** (tutlanda) kaj **Canale10** (regiona) elsendis specialajn servojn pri niaj kongresoj. Kun ili, la toskania televidĵurnalo de **RAI3** (tria kanalo de la ŝtata televido). Aldoniĝis pola televidstacio kaj radio de Sidnejo. Ankaŭ kroata katolika informagentejo IKA sciigis pri nia UK.

*Prezidanto Corsetti laŭdegis nian kongresan kurieron: “Samkiel dum la majorio de la UK’oj, ankaŭ oldaj, en kiuj mi partoprenis, ankaŭ en Florenco mi povi legi stencilajon, kiu, en minca eldono, kapblas redoni, jovial-stile kaj diĝeste, tiom multajn datumojn. Realigi kurieron estas dificila tasko. Mi ĝojas, ke la esperantistoj de Italio, kun la helpo de alilandaj esperantistoj, sukcesis prizorgi ĉion, ekde kompostado. Licas do dankegi al ili”.*

**En [www.uk2006.info](http://www.uk2006.info)  
vi trovos ĉiujn LILIOJN  
kiuj burĝonis por la UK**

## Por kontakti la redakcion:

- Vi povas VENI al la Gazetara Servo, en Salono Fighiera-Sikorska, teretaĝe, en la kongresejo;
- aŭ Vi povas SENDI retpoŝtan mesaĝon al adreso: <[kontaktu-lilion@yahoo.com](mailto:kontaktu-lilion@yahoo.com)>
- aŭ Vi povas TELEFONI al itala poŝtelefono: (+39) 338 860 20 84. Al ĝi Vi povas sendi ankaŭ SMS’n.

Por la realigo de ĉi tiu 5a Lilio, kunlaboris Giovanna Licciardello, Carlo Sarandrea kaj Marija Belošević

La averaĝa eldonkvanto de la FLORENCA LILIO estas 2000 ekzempleroj. Plej altan kvanton oni presigis jaŭde, ĉar oni ankaŭ reeldonis

**Memore pri Ada (1996-2006).** Antaŭ 10 jaroj mortis Ada Fighiera-Sikorska. La 7-an de aŭgusto 1996 forpasis en Torino (Italio) Ada Fighiera-Sikorska, honora membrino de UEA, redaktorino dum 35 jaroj de la tiam sendependa gazeto “Heroldo de Esperanto”. Por honori ŝian agadon por Esperanto, UEA reeldonis la broŝuron de la edzo “La lastaj tagoj de Ada, Aduŝka”. Por pliaj informoj oni povas kontakti jenan ret-adreson: <[giancarlo.fighiera@libero.it](mailto:giancarlo.fighiera@libero.it)>

## ^cu parencoj?

**Brian Moon (KN 381)**

kaj

**Giuseppe Ver-**

**di,**

